Фёдор Сологуб,

La disipulo

tradukita de Manfred Retzlaff

Stulte mi eluzis korpon mian,
Disipado estis tio ĉi,
Vidas elirejon mi nenian,
Nude, neŝirmite staras mi.

Kaj mi preĝas al la kara Dio,
-Tiel mi neniam petis Lin -:
“Donu Vi al mi da energio
iom, kiu plu vivtenos min.

Neporteblaj afliktiĝoj teraj,
Kaj tro granda tera vivopen’,
Sed kontraŭe ĉarmoj primaveraj
Kaj freŝiga akva ĉirkaŭpren’!

Kiel ardas la purpur-aŭroroj,
Kiel igas revi la jasmen’,
Kiel rave amas inaj koroj,
Kiel kisas lipoj kun ĝojplen’!

Kaj ankoraŭ ĉi kisad’ pasia, 1)
Kaj jasmen-aromo tiu ĉi,
La revado forta, idilia,
Kaj de l’ versoj dolĉa melodi’!

. . .

Gloro kaj potenco estas via!
Mi Vin petas, kompatema Di':
Donu iom al vivtempo mia,
Por ke pluajn kantojn verku mi!“

Traduko de la Rusa poemo “Расточитель” de Фёдор Сологуб *(Fjodor Kusmiĉ Teternikov, ∗1863-03-01 – †1927-12-05) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2002-08 .*

MR-392-1a / Arg-385-758 (2007-02-06 12:17:32)

La vera nomo de la poeto estis: Фёдор Кузьмич Тетерников (Fjodor Kusmiĉ Teternikov), Фёдор Сологуб (Fjodor Sologub) estis lia kaŝnomo (pseŭdonimo).